SEK-Bulteno

Informilo de Saenzpenja Esperanto-Klubo
Eldonita ekde novembro 1990 en hispana kaj Esperanta lingvoj.
Diskonigas pri la Internacia Lingvo kaj pri ĝeneralaj regionaj novaĵoj.

N° 37 **oktobro-decembro** **2012 [4]**



Participantes del 54° Congreso Argentino de Esperanto. Balcón de la sede Casal de Catalunya. (Oct./ 2012).

Post dek tri jaroj AEL kongresis denove

Informoj sur paĝo 6 kaj 12

SEK-Bulteno

N° 37 Octubre-Diciembre 2012 [4]
Boletín informativo del
Club Saenzpeñense de Esperanto.
Fundado en noviembre de 1990 por
Rubén T. Diaconu Tkachenco

Distribución
SEK-Bulteno se edita y difunde con la colaboración voluntaria de los miembros y simpatizantes de SEK y su distribución es gratuita.
Se envía a más de 600 direcciones de correo electrónico de esperantistas y simpatizantes en más de 32 países.
También puede ser leído y/o "bajado" de: **www.gazetejo.org**

Redacción
Calles 119 y 122
H3700FTT Pcia. R. Sáenz Peña
Chaco, Argentina
E-mail:
rubendiaconu@yahoo.com.ar

Saenzpenja Esperanto-Klubo

Redacción general
Rubén Teofil Diaconu Tkachenco
Miembro y Delegado local de UEA
(*Universala Esperanto-Asocio)* Holanda

Colaboradores
Emmanuel Maggiori (Buenos Aires)
Ernesto R. Moreira Martin (Córdoba)
Carlos Devizia (Buenos Aires)

El contenido de *SEK-Bulteno* no necesariamente representa la posición ni la opinión de SEK y/o la Redacción.
Son responsables
quienes subscriben los mismos.



Amigos lectores:

En pocos días más estará finalizando un año que sin dudas perdurará en la historia saenzpeñense: 1) festejamos el centenario de la fundación de nuestra ciudad, pero también, 2) de grandes novedades para el movimiento argentino de esperanto, pues se reanudaron los congresos nacionales y se anunció la elección de Argentina como sede del Congreso Universal de Esperanto 2014. Por eso queremos como siempre expresar un profundo agradecimiento a todos quienes nos acompañaron y apoyaron.

Con el anhelo de volver renovados en el 2013 deseamos a todos lo mejor en estas fiestas de Navidad y Año Nuevo.

La Redacción



"Vojaĝo en Esperanto-lando" de B. Kolker, el libro de curso más vendido en los últimos años.
http://novajhoj.weebly.com/voja285o-en-esperanto-lando1.html

Locales

Con asistencia de unas 10 mil personas

Culminó con éxito la Primera Expo Feria de la Colectividades

La Expo Feria de Colectividades se realizó del 5 al 7 de octubre de 2012 en el Centro de Convenciones del Multiespacio Ferial “Fibra Chaco” de Presidencia Roque Sáenz Peña.



Se trata de un evento organizado por la Federación de Colectividades Extranjeras de nuestra ciudad que contó también con el apoyo de la Fiesta Nacional del Algodón, el auspicio de Lotería Chaqueña y el Gobierno de la Provincia del Chaco.

El objetivo de la Expo fue mostrar a la población, tanto local como de toda la provincia, una síntesis de la ideología e historia de los oriundos de los pueblos que han elegido esta porción del suelo argentino para radicarse y formar sus familias.

La exposición contó con la participación de 16 colectividades extranjeras, entre ellas la checa, eslovaca, yugoslava, búlgara, italiana, española, israelita, ucraniana, árabe y sirio-libanesa, así como la colectividad húngara de la ciudad de Villa Ángela y la alemana del Volga de la ciudad de Juan José Castelli. También estuvieron presentes los organizadores de la Fiesta Provincial del Inmigrante de la ciudad de Las Breñas.

Durante las tre noches del evento se pudo disfrutar de espacios culturales, stands de artesanías y también de un amplio patio de comidas, en el que se ofrecieron los platos típicos de cada colectividad. En la exposición también se dispuso un escenario mayor, por el que desfilaron conjuntos musicales y grupos de baile de las diferentes colectividades.

Breve reseña de la inmigración europea al Chaco

Haciendo un breve análisis sobre los inicios en el asentamiento de inmigrantes a la Argentina y más concretamente en el Chaco, cabe destacar que en el período entre los años 1914 y 1947 el Chaco experimentó un crecimiento extraordinario, el más alto de toda la Argentina en esa misma época. En dicho período el (en ese entonces Territorio Nacional del Chaco) multiplicó su población, pasando de 46.274 a 430.555 habitantes.

El crecimiento anual medio por cada 1.000 habitantes fue del 48,8, seguido por Formosa con el 43 y Misiones con el 39, duplicando al 20,4 del promedio nacional.

Las áreas de mayor crecimiento demográfico entre 1920 y 1934 fueron el centro y el sudoeste del territorio (departamentos Coronel Martínez de Hoz, Napalpí, y Campo del Cielo), con cifras que multiplicaron por ocho y aún por diez los valores de 1920. Estos distritos recibieron el 90% de los 14.894 europeos ingresados al Chaco por cuenta del Estado en el decenio 1920-1930 (esta cifra no incluye al alto número de los colonos llegados por sus propios medios).

A esta inmigración de origen europeo y al ingreso de habitantes de otras provincias argentinas, sumados a un alto crecimiento natural, se debió el impactante aumento demográfico chaqueño.

Las localidades y zonas rurales de influencia más beneficiadas en esa etapa fueron Presidencia Roque Sáenz Peña, con el 34% del total; Villa Angela 18%, Charata 17% y Las Breñas 8%. Otros pueblos cercanos a éstos (Campo Largo, Cote Lai, Corzuela, General Pinedo,







Machagai y Quitilipi) sumaron conjuntamente un 7,5% de dicha cifra.

Si bien hasta la década de 1920, los italianos y españoles constituyeron la mayoría de los inmigrantes, desde este año y hasta 1930 las nacionalidades ingresadas por cuenta del Estado fueron: polacos 24%; italianos 22%; yugoslavos 13%; búlgaros 11%; españoles 9%; alemanes 8%; checoslovacos 7%, y rusos, lituanos y ucranianos sumaban 2%. No obstante, según datos del Censo territorial de 1934, en la suma total, españoles e italianos constituían las colectividades más numerosas.



Apreciaciones de funcionarios

Refiriéndose a la **Primera Expo Feria de las Colectividades**, Crucita Pereyra, Presidente del Concejo Deliberante de la Ciudad Termal expresó lo siguiente: *"Es un encuentro con las emociones, con esas emociones que provocan los recuerdos en aquellas personas que han llegado cuando recién la ciudad se estaba organizando como tal. Y el recuerdo que quizás todavía guardan en sus retinas de aquel día que dejaron su tierra querida para venir a sembrar sus raíces en estas tierras que los recibió generosamente".*

Asimismo, Hugo Atanasoff, Presidente de la Comisión Fiesta Nacional del Algodón, destacó en primer lugar el desfile que realizaron las colectividades representando a los inmigrantes, *"porque nosotros, nuestra sociedad, es producto de varias inmigraciones. Nosotros debemos ser custodios de las culturas que hacen que exista esa sociedad de hoy, tenemos que ser custodios de nuestros orígenes junto a los pueblos originarios, junto a los criollos y junto a todos los gringos que vinieron a formar parte de esta sociedad que hoy es una realidad pujante, fuerte y decidida a no bajar los brazos".*

"Como presidente de la Fiesta Nacional del Algodón asumimos un compromiso con cada evento que se hace. Y dejo el saludo del Gobernador de la provincia, que es un hombre muy comprometido con todos aquellos que hacen posible este tipo de eventos culturales", agregó el funcionario. También agradeció en nombre del Gobierno de la Provincia a la Federación de Colectividades por la realización de esta exitosa exposición.

Pedro Marcoff, Presidente de la Federación de Colectividades, agradeció el acompañamiento y apoyo del Gobierno de la Provincia, la Fiesta Nacional del Algodón, la Municipalidad y la comunidad saenzpeñense que asistió masivamente cada noche y en particular agradeció a cada una de las agrupaciones que decidieron compartir y mostrar su cultura en este evento.

Fuentes:

http://www.chacodiapordia.com/noticia.php?n=69280
http://www.diarionorte.com/noticia.php?numero=91017
http://loteria.chaco.gov.ar/index.php/page/1470
http://www.futuro-digital.com.ar/

Buenos Aires

Congreso Argentino de Esperanto

Tal como se había anunciado, el 6 y 7 de octubre de 2012, se realizó el 54° Congreso Argentino de Esperanto.

Información: Gentileza de Mabel Ojeda
Fotos: de Internet y Max Elbo.

En la tradicional sede *Casal de Catalunya,* del barrio de San Telmo, Ciudad Autónoma de Buenos Aires, aproximadamente 50 esperantistas, argentinos brasileños e italianos, se dieron cita a los efectos de la realización del 54° Congreso de la Liga Argentina de Esperanto.

Recordemos que el 1° Congreso Argentino de Esperanto se realizó en Rosario, en 1941. En dos oportunidades se realizaron en Presidencia Roque Sáenz Peña, *(el 49° en 1989 y el 52° en 1998).* El último congreso se realizó en Bariloche en el año 1999. Por tal motivo volver a participar de un Congreso Argentino de Esperanto fue una gran expectativa.

El congreso se desarrolló bajo el lema: "El esperanto como puente a la paz, la amistad y el desarrollo. Integración regional, turismo y economía".

Tal lo expresado por Mabel Ojeda, integrante de la Comisión Directiva de la Liga Argentina de Esperanto durante el congreso *"Hubo rondas de debate organizadas de acuerdo a la capacidad de expresarse en esperanto (por niveles)."*





Según el programa previsto se presentaron diversos temas. Podemos destacar: “Mente y Paz”; “Alternativas deportivas”; la Nanotecnología; la Homeopatía. Se proyectó el documental “La Universala Lingvo” (La Lengua Universal) y se entregaron los certificados del examen de esperanto del curso KER de “Edukado.net” realizados el pasado 9 de junio. Además, se presentó información relacionada con la juventud esperantista internacional (TEJO). Como no podía faltar en Buenos Aires, también de demostraron lecciones de baile de tango. Se disfrutaron de amenos momentos de pausa, -pizza, café o té de por medio-, y muy particularmente del arte culinario de Hungría que tras la presentación de la charla los participantes pudieron degustar las cazuelitas de sopa húngara. Por supuesto también se realizó la Asamblea Anual de la Liga Argentina de Esperanto. Sobre la Asamblea podemos anticipar, tal lo adelantado por la Sra. Ojeda, que: ‘se anunciará una asamblea extraordinaria para el 8 de diciembre de este año a los efectos de ir consolidando las tareas preparatorias para el Congreso Mundial de 2014 y se presentaron propuestas para que la próxima asamblea anual se realice en alguna ciudad del interior del país’, por ejemplo en Las Grutas (Río Negro), Carlos Paz (Córdoba) u otras que se propongan.



Con mucha emoción al finalizar el congreso los participantes entonaron las estrofas del himno esperantista “La Espero”. *“Hubo mucha emoción”,* agregó Mabel Ojeda, *“sobretodo de los mayores que conocieron otras épocas del “esperanto-movado” (movimiento de esperanto), que al ver mucha gente joven involucrada sintieron la alegría de ver que el Esperanto continúa creciendo como idioma y como puente de comunicación.”*

El desarrollo del congreso fue registrado por un camarógrafo. *“Este video estará próximamente en Youtube, al igual que el otro que armamos titulado "Esperanto funciona" que ya se puede ver en Youtube”,* dijo Mabel Ojeda a nuestra redacción.-

La sede del congreso

Wikipedia: http://es.wikipedia.org/wiki/Casal_de_Catalunya
Lic. Marcela Lucci: http://ddd.uab.cat/pub/tesis/2009/tdx-1027110-012920/ml1de1.pdf
http://www.ahistcon.org/docs/murcia/contenido/pdf/08/marcela_lucci_taller08.pdf

Sin ahondar en asuntos políticos, la historia de los catalanes en Argentina es un tema muy interesante y de profundo estudio, tal lo realizado por la Lic. Marcela Lucci en su trabajo "Los catalanes de América" y en su "Tesis de doctorado" presentada en 2009 en la Universidad Autónoma de Barcelona.

Tengamos también en cuenta que de la mano de los catalanes el esperanto llegó a la Argentina en la misma década que se inició en Europa. Ya en los 1900, en la calle Tacuarí 1402, funcionó el *Grupo Esperantista Casal Catalá.* En 1912 se comenzó a editar la gaceta "Esperanta Stelo" en la primera imprenta esperantista argentina.

"El *Casal Català*, asociación fundada en 1908, tuvo desde sus orígenes una orientación claramente catalanista. Al contrario del *Centre Català*, sociedad fundada en 1886 que se identificaba con el regionalismo y mantenía una relación habitual con la colectividad española porteña, el *Casal Català* adscribió abiertamente al independentismo catalán e intentó permanecer al margen, tanto hacia dentro de la colectividad cuanto hacia la sociedad argentina, de toda agrupación o representación gubernamental española."

Sin embargo, podemos señalar que en un principio las actividades sociales y culturales se llevaron a cabo en el *Casal Català* porteño. Posteriormente la unificación del *Casal Català* con el *Centre Català,* cuyas negociaciones comenzaron en 1940, se cristalizó en 1941 y pasó a llamarse *Casal de Catalunya.*

Historia de la sede de la calle Chacabuco

El *Casal de Catalunya* es un centro cultural de la comunidad catalana en Buenos Aires, Argentina. En el funcionan, además, el restaurante "Hostal del Canigó" y el Teatro Margarita Xirgu. Se encuentra en la calle Chacabuco 863, en el barrio de San Telmo. Es el casal catalán más antiguo del mundo, fuera de Cataluña, que mantiene su nombre de origen y la continuidad jurídica e institucional.

En 1889 el miembro de la comunidad Lluís Castells y su esposa Elisa Uriburu adquirieron un terreno en la calle Chacabuco, cediéndolo por tiempo indefinido al gobierno español. Allí funcionaron en un principio no solo el *Centre*, sino además el *Montepío* (casa de empeños), la Cámara de Comercio Hispano-Argentina (creada en 1887) y el Consulado de España.

En 1909 Castells compró la parcela contigua al norte (Chacabuco 855), y la cedió de igual forma. Allí se instaló la biblioteca "Pompeu Fabra", el restaurante y otras dependencias. Más tarde ambas construcciones se unificarían internamente al demoler la pared medianera.

En 1924 la Cámara de Comercio y las dependencias diplomáticas abandonaron el edificio, de tal forma que el Estado español ofreció la propiedad al *Centre Catalá* y al *Montepío.* Este último renunció a su parte, y en 1927 el centro se transformó en propietario único gracias a un crédito a 30 años del Banco Hipotecario Nacional.

En 1936 se inauguró con motivo del cincuentenario de la institución la nueva fachada, obra de los arquitectos españoles Julián García Núñez y Eugeni Campllonch, y cuya inscripción indica a "Pauli y Coll" como constructores.

El edificio se destaca por su estilo modernista y muy ornamentado, que contrasta con las abundantes casas de más sobrio estilo italianizante de comienzos de siglo XX en los terrenos cercanos.



Para ser feliz

Las 13 claves para ser feliz según un profesor de Harvard.

"Amigos de Baldomero" (*)

Desde hace varios años se dicta el curso para obtener felicidad.

El curso se llama "Mayor felicidad" y es dictada por Tal Ben-Shahar, un israelí experto en psicología positiva.

A pesar de ser un curso electivo, cada semestre 1.400 alumnos de diferentes carreras se inscriben en él.

La felicidad es el anhelo de cualquier persona, pero muchas veces no se sabe cómo alcanzarla.

Por esto, la Universidad de Harvard diseñó un curso que ayuda a conseguir ese estado, cátedra que se ha convertido en una de las más populares de esa prestigiosa casa de estudios.

La cátedra está fundamentada en encuestas y estudios de campo sobre las características y componentes que permiten vivir felizmente.

En este curso Ben-Shahar, también conocido como el gurú de la felicidad, entrega 13 consejos que contribuyen a alcanzarla.

1.- Realiza algún ejercicio: Los expertos aseguran que hacer actividad física es igual de bueno que tomar un antidepresivo para mejorar el ánimo. Treinta minutos de ejercicio es el mejor antídoto contra la tristeza y el estrés.

2.- Toma desayuno: Algunas personas se saltan el desayuno porque no tienen tiempo o porque no quieren engordar. Diversos estudios demuestran que desayunar ayuda a tener energía, pensar y desempeñar éxitosamente las actividades.

3.- Agradece a la vida todo lo bueno que tienes: Escribe en un papel 10 cosas que tienes en tu vida que te dan felicidad. Cuando hacemos una lista de gratitud nos obligamos a enfocarnos en cosas buenas.

4.- Sé asertivo: Pide lo que quieras y di lo que piensas. Está demostrado que ser asertivo ayuda a mejorar la autoestima. Ser dejado y aguantar en silencio todo lo que te digan y hagan, genera tristeza y desesperanza.

5.- Gasta tu dinero en experiencias no en cosas: Un estudio descubrió que el 75% de las personas se sentía más feliz cuando invertía su dinero en viajes, cursos y clases. En tanto, sólo el 34% dijo sentirse más feliz cuando compraba cosas.

6.- Enfrenta tus retos: No dejes para mañana lo que puedes hacer hoy. Estudios demuestran que cuanto más postergas algo que sabes que tienes que hacer, más ansiedad y tensión generas. Escribe pequeñas listas semanales de tareas a realizar y cúmplelas.

7.- Pega recuerdos bonitos, frases y fotos de tus seres queridos por todos lados: Llena tu refrigerador, tu computador, tu escritorio, tu dormitorio, en fin, tu vida de recuerdos bonitos.

8.- Siempre saluda y sé amable con otras personas: Más de 100 investigaciones afirman que sólo sonreír cambia el estado de ánimo.

9.- Usa zapatos que te queden cómodos: Si te duelen los pies es seguro que te pondrás de mal genio, asegura el doctor Keinth Wapner, Presidente de la Asociación Americana de Ortopedia.

10.- Cuida tu postura: Caminar derecho con los hombros ligeramente hacia atrás y la vista hacia el frente ayuda a mantener un buen estado de ánimo.

11.- Escucha música: Está comprobado que escuchar música te despierta deseos de cantar y bailar, lo que alegra la vida.

12.- Aliméntate bien: Lo que consumes tiene un impacto importante en tu estado de ánimo. Por esta razón, lo recomendable es comer algo ligero cada tres o cuatro horas para así mantener los niveles de glucosa estables; no saltarse comidas; evitar el exceso de harinas blancas y el azúcar; comer de todo y variar los alimentos.

13.- Arréglate y siéntete atractivo(a): El 41% de la gente dice que se siente más feliz cuando piensa que se ve bien. ¡Arréglate bien y sé feliz!

(*) Fuente: HARVARD MAGAZINE

http://amigosdebaldomero.blogspot.com.ar/2012_10_01_archive.html

Esperanto estas facila



Tiel ni ĉiam prezentas la lingvon en niaj propagandiloj, ĉu ne? Fiere ni ilustras, kiel eblas krei tutan serion da vortoj surbaze de la sama radiko: ĉevalo, ĉevala, ĉevale, ĉevalino, ĉevalido, ĉevalejo; bela, bele, beleco, belulo, beli, beligi; unu, unua, unuo, unueco, unuiĝo, unuigi – kaj kontrastas tion kun la neregulaj kaj pluroblaj radikaroj de aliaj lingvoj.

Kiel ĉiu artisto scias, simpleco ne estas facile akirita. Poeto ŝvitas dum horoj, fortajlante nenecesajn vortojn, ĝis restas nur unu perfekte tornita frazo. Simile, Zamenhof laboris dum pli ol jardeko por atingi ĉefverkon de simpleco.

La facileco de Esperanto efektive estas motivo por lerni ĝin; tial, cetere, mi mem ekinteresiĝis pri ĝi. Ĝia facileco tenas la entuziasmon de lernantoj, kiuj rimarkas post malmultaj lecionoj pli grandan progreson ol eblus eĉ post plurmonata studado, se ili lernus alian lingvon.

Unu el la plaĉaj aspektoj por novaj esperantistoj estas la ebleco mem krei vortojn: ne per enkonduko de novaj radikoj, sed per kombino de ekzistantaj radikoj kaj uzo de sufiksoj. Kiel instruisto mi rimarkas, ke komencantoj aparte ĝuas la lecionon pri la mal-vortoj: ili malkovras kun plezuro, kiel lerninte longa, nova, juna ktp, ili mem povas krei mallonga, malnova, maljuna.

Esperanto havas la aspekton de latinida lingvo, kaj tial parolantoj de tiuj lingvoj tro facilanime emas enkonduki novajn vortojn. Se oni ne scias, ekzemple, kiel diri illegal aŭ editorial, estas multe pli facile diri ilegala aŭ editorialo, ol cerbumi kiel plej trafe esprimi tiujn konceptojn en Esperanto. Mi kredas, ke alta proporcio de la vortoj, kiuj plenigas niajn vortarojn, ekaperis en la lingvo pro nepensemo de parolantoj. Tiel ili faciligas la lingvon por si mem, sed ne nepre por siaj legantoj aŭ aŭskultantoj. Por ke Esperanto retenu sian simplecon, necesas pensi.

Aliaj vortoj aperis tutsimple pro eraroj. Kiam amaso da homoj, ekzemple, kune marŝas tra la stratoj por fari politikan proteston, tio estas manifestacio. Por parolantoj de eŭropaj lingvoj, estas tro facila eraro nomi tion demonstracio – tiun vorton mi eĉ foje vidis en revuo Esperanto (ne lastatempe, sed antaŭ 10-15 jaroj). Por eviti tiajn erarojn, necesas kontroli en vortaro, kiam oni ne certas pri vorto, anstataŭ senpripense supozi, ke oni jam scias. Mi memoras, kiel mi mem, kiel nesperta sed tre entuziasma esperantisto, preskaŭ skribis la vorton parmezano sur mian aĉetliston. Poste mi pensis, ke tamen estus bona ideo kontroli en la vortaro, kaj malkovris, ke tio nomiĝas en Esperanto parma fromaĝo (t.e. fromaĝo el la urbo Parma). “Ha, kompreneble!” mi pensis. “Kiel bonŝance, ke mi kontrolis!” La problemo estas ne nur, ke nespertuloj ne kontrolas, sed ke poste la vortaroj reprenas kaj disvastigas iliajn erarojn. Alia granda fonto de tiaj eraroj estas Vikipedio, en kiu nun ja aperas la kapvorto Parmezano. Konsiderante la fakton, ke tiu itala fromaĝo nomiĝas en la itala parmigiano, tiu angla-franca formo vere ne havas sencon.

Neniu normale provus aldoni novan radikon al nature evoluinta lingvo, sed ĉar Esperanto estas artefarita, eĉ komencantoj opinias, ke ili rajtas kaj povas plibonigi la laboron de Zamenhof. Mi legis iam proponon pri nova vorto ekvila en la kunteksto ekvila komerco. Kiel Esperanto elturniĝis dum la lastaj 120 jaroj sen la vorto ekvila? Tre simple: per la vorto justa. Tiun ekzemplon vi ne trovos en la paĝoj de La Bona Lingvo (bonŝance tiu propono estis mortnaskita), sed amason da aliaj: cis, humanitara, violenta ktp, ktp.

Iuj esperantistoj opinias, ke ili rajtas proponi ŝanĝon al la vorttrezoro tutsimple ĉar ili ne ŝatas ekzistantan vorton, kaj pensas, ke alia formo estus pli bona aŭ pli bela. Tiel, apud la Fundamentaj vortoj kruro, besto, vinbero kaj presi aperis gambo, animalo, uvo kaj printi. La ĉiama preteksto estas, ke estas iu esenca distingo en la signifo: ekzemple, ke kruro rilatas nur al la parto inter la piedo kaj la genuo, dum gambo estas la tuto; aŭ ke animalo rilatas al ĉiuj bestoj inkluzive de la homo. La praktika (kaj certe ankaŭ la celita) rezulto estas iompostioma anstataŭigo de la Fundamentaj vortoj per aliaj pli laŭ la gusto

de ties uzantoj. La sekvo estas, ke anstataŭ lerni nur unu vorton, komencantoj devas lerni du kun praktike la sama signifo – ĉar kompreneble la malnova formo ne falas el la uzado. Kien do malaperis la facileco de Esperanto?

Por lernantoj de Esperanto estas tre kuraĝige konstati, ke ili mem povas per kombinado de radikoj kaj sufiksoj multobligi sian vorttrezoron. Bedaŭrinde, iuj esperantistoj kredigas al ili, ke tiaj kunmetitaj vortoj ne estas serioza parto de Esperanto, ke ili apartenis al primitiva fazo de la lingvo, nun superita. Tiun vidpunkton mi iam aŭdis ankaŭ de nesperta esperantisto: ŝi plendis, ke ŝi ne havas sufiĉe grandan vortprovizon en Esperanto – jes, ŝi scias, ke eblas mem krei vortojn, sed ŝi volas lerni la "ĝustan" nomon de la koncerna objekto. Evidente, ŝiaj instruistoj jam konvinkis ŝin, ke la kunmetaĵoj, kiujn ŝi mem elpensas, estas duarangaj anstataŭaĵoj, uzindaj nur se oni ne konas la "veran" terminon.

Ni ĉiuj konas la faman rakonton pri la eta Ludoviko kaj la dolĉaĵvendejo: ke vidante la rusan vorton konditorskaja (sukeraĵejo) li ekkomprenis, kiel per sistemo de afiksoj li povos limigi la bezonatan radikaron de sia nova lingvo kaj tiel faciligi la taskon de lernantoj. Ĉu ne plu validas tiu brila inspiro de Zamenhof? Ŝajne ne – precipe dum ĉiu duonbakita duonkomencanto kredas, ke li aŭ ŝi rajtas proponi aldonojn al la vortaro. Tiel ekestas situacio, en kiu la radikaro konstante kreskas, kaj lernantoj estas devigataj dediĉi horojn por studi ĝin. Tion sugestas ekzemple la paĝaro Lernu! per sia rubriko "Vorto de la tago", kiu rekomendas amason da nenecesaj vortoj: lokalizi, delico, akomodi, fetoro, sukuri ks.

Kunmetado estas la ĉe la kerno de la Esperanta vortfara sistemo. Ni ne donu al komencantoj listojn de novaj vortoj parkere lernendaj; anstataŭe ni montru al ili, kiel surbaze de malgranda radikaro, ili povos mem esprimi preskaŭ ĉiujn normale bezonatajn konceptojn.

http://www.bonalingvo.org/index.php/Simplaj_samsignifaj_vortoj
Elektronika poŝto: la.bona.lingvo@gmail.com
Anna Lowenstein

Ĉu la plej granda Esperanto-libro?

Kiel rezulto de 20-jara sizifa laboro de d-ro Máthé Árpád, aperis en Budapeŝto "Bibliografio de Esperantaj periodaĵoj."

La datumbaza kolekto listigas 14.173 Esperanto-gazetojn, revuojn kaj aliajn periodaĵojn ekde 1887 ĝis hodiaŭ, kun iliaj nomoj, eldonjaroj, redaktoroj, ĉefaj sciindaĵoj, ktp! Ŝajne la libro - aperinta antaŭ 2 jaroj - estas unu el la plej "grandaj" Esperantaj libroj, ĝi pezas 3,3 kilogramojn, kaj enhavas 1155 paĝojn en formato A/4.

La libron redaktis kaj kompilis en 99 %-oj d-ro Máthé Árpád, sed pro troa modesteco li ĉie antaŭenŝovas nomojn de aliaj kunlaborantoj (L. Yzal Hernández kaj A. M. Molera).

Por prizorgi kaj solvi problemojn de kompostado, eldonado, financado kaj distribuado helpis nia Budapeŝta E-Centro "Eventoj".


La Bibliografio en papera formo aperis nur en 30 ekzempleroj, ĉefe por eniri la registradan sistemon de sciencaj verkoj, kaj por deponi ekzempleron en la plej grandaj bibliotekoj (ŝtataj kaj movadaj).

La datumbazo de la periodaĵoj aperas ankaŭ en PDF-formato, kiu ebligas rapidan serĉadon kaj trovon de unuopaj esprimoj.

Redaktoro de la bibliografio, d-ro Máthé Árpád estas kontaktebla pere de la adreso: *oficejo@eventoj.hu*

Szilvási László

Vidu la foton ĉe:
http://www.facebook.com/photo.php?fbid=3962699984564&set=a.1838311956191.2097929.1192265667&type=1&theater&notif_t=like
fonto: Ret-Info
http://www.eventoj.hu



Post dek tri jaroj AEL kongresis denove

La 6-an de oktobro 2012 je la 11h00 malfermiĝis
la 54-a Argentina Kongreso de Esperanto.



La kongreso, kies temo "Esperanto kiel ponto al la paco, amikeco kaj evoluigo" allogis samideanojn el Argentino, Brazilo kaj eĉ Italio, estis baze organizita de Bonaera Esperanto-Asocio kaj ricevis apogon de pluraj kunlaborantoj.

Niaj ceremoniaj majstrinoj, Romina Gayo Streinzer kaj Stephanie Cabovianco, brile enkondukis la programon.

Kun la ĉeesto de pli ol 50 partoprenantoj malfermis la kongreson Mabel Ojeda kaj Jorge Enrique Cabrera, prezidantino kaj sekretario de Argentina Esperanto-Ligo.

Per bonvenigaj vortoj ili prezentis ĉi tiun eventon kiel aliajn venontajn (la argentinan regionan kongreson 2013), kadre de prepariga evento por la okazonta Universala Kongreso de Esperanto en Argentino 2014.

Ĉi tiu evento, okazis en *Casal de Catalunya,* belega domego de moderna kaj novgotika stilo, konstruita antaŭ cent dudek ses jaroj en la kvartalo de San Pedro Telmo en Bonaero, ĉefurbo de Argentino.

Sed ne hazarde oni elektis ĉi tiun imponan konstruaĵon -kiu estas plej malnova "Casal" en la mondo, krom la kataluna, kiu enhavas la faman teatrejon *Margarita Xirgu*, ĉar ĝuste ĉi tie oni trovas spurojn el nia viva Esperanta historio. Ekestis ĉi tie la plej granda asocio de Esperanto, en la unuaj jaroj de la dudeka jarcento, fondita de katalunoj, pioniroj de nia lingvo en ĉi tiu lando.

Inter aliajn ni ricevis salutojn el Hispanio, Kataluna Esperanto-Asocio, kaj precize de tiu lando venis José Prat, kiu trovis en Buenos Aires kaj en *"Casal Catalá"* sian neston kaj intelektan rifuĝon. Proksime de la placo *Dorrego*, kerno de bonaera historio, oni povas imagi kiel ili nutriĝis de la muzika grupo "L'orfeo Catala", la biblioteko "Pompeu Fabra", sidejo de la loka Kataluna Asocio kaj de la monhelpa institucio *"Montepio"*.

Kaj pri José Prat kaj lia intensa agado por la Esperanta movado, parolis la nepinon, Patricia Prat, kiu venis, ankaŭ akompanata de la pranepino de José Prat, (nevino de Patricia Prat), el la argentina provinco de *Córdoba*, por transdoni al ni profundan esploron pri la vivo de sia avo. Ĉi tiu esploro, bazita en valorindaj dokumentoj, malkaŝis al la aŭdantaro, figuron de pasia viro, plene dediĉita al siaj idealoj.

Ankaŭ oni devas mencii la konstantan kaj gravan taskon farita de Antonio Ferrer (bibliotekisto de Bonaera Esperanto-Asocio), en la kolekto de postsignoj por la kompletigado de nia esperanta historio.

Ni profitis la okazon por omaĝi al José Prat kaj ankaŭ, al *Casal de Catalunya*, kiel la unuan plej grandan esperantan asocion dum la unuaj jaroj de la lasta jarcento, (enhavante tiumomente 125 membrojn).

Kaj okaze de la centjariĝo de la esperantista eldonejo, ni alvokis al la prezidanto de *Casal de Catalunya,* s-ro Josep Puig, kiu ricevis faksimilon de la unua esperantista revuo, eldonita en la *Casal Catalá*, por aldoni al la biblioteko de la asocio.

Poste oni legis kelkajn ricevitajn salutojn: de Amerika Komisiono de UEA (Rubén Teofil Diaconu, reprezentanto); Brazila Esperanto-Ligo (d-ro Lício de Almeida Castro, prezidanto); Esperanto-Rondo el *Mendoza* (Roberto Sartor, Gabriel Santin); Saenzpenja Esperanto-Klubo (Berna Morzán, Alicia Aranda, Carlos Stacul, Rubén Diaconu); Grupo Kapelo de la Monto-urbo, Córdoba (Sara Calviño, Guadalupe Cappelletti, Cristina Guerrero, Daniel González, Patricia Lamartine Rubén Ernesto Moreira); s-ro Probal Dasgupta,

prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, inter aliaj. Je la fino de la malferma ceremonio, ĉiuj estis invititaj por ĝui fratecan interkonan tagmanĝon kaj kompreneble...tosti.

Kiam la partoprenantoj envenis en la salonegon, je la maldekstra flanko de la larĝa koridoro troviĝis libroserva budo, belegaj (kaj aĉeteblajn) T-ĉemizoj, kejloj, faksimiloj, ktp... dum trinkaĵojn kaj manĝaĵojn, pli antaŭen jam estis pretaj.



Ni ricevis viziton de Pradial Gutierrez (filo de Clara de Hess, fama argentina esperantistino) kiu emociiĝis kaj estis intervjuita de Mabel Ojeda.

Je la post-tagmezo eventoj komenciĝis. Je la mano de Jorge Montanari ni spektis sciencan prelegon pri Nanoteknologio kaj aplikoj en scienco, industrio kaj en nia ĉiutaga vivo.

D-ro Joao Silva dos Santos sperte, parolis al ni pri Homeopatio, ĉefaj diferencoj inter Alopatio kaj Homeopatio, pri la D-ro Samuel Hahnemann kaj la libro "Organo de la arto kuraci", pri la leĝo de la Infinitezimaj, kaj pri multaj ege interesaj temoj kiuj malkovris al ni ampleksan kriterion pri kuracado, sanon kaj malsanon.

Post la kafopaŭzo estis enkonduko de Jorge Enrique Cabrera en la ronda tablo kiel spaco de integriĝo, kadre de la lasta Rezolucio de la Universala Kongreso de Esperanto:

***"125-jara, Esperanto konstruas pontojn al pli justa kaj paca mondo**, kunvenante en Hanojo, Vjetnamio, de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012, pli ol 800 partoprenantoj en la 97-a Universala Kongreso de Esperanto rekonfirmas la gravecon de lingvo konstruita sur la idealoj de paco, amikeco, kaj reciproka respekto.*

Por homoj el ĉiuj landoj kaj vivofonoj, Esperanto proponas praktikan kaj potencan rimedon por rekta kontakto, reciproka interkonatiĝo kaj profunda amikiĝo.

Por mondo kie ankoraŭ abundas konfliktoj kaj maljustaĵoj, Esperanto proponas kulturon de paco, kiun kunkonstruas en egaleca etoso homoj el ĉiuj kontinentoj.

Por internacia komunumo kiu klopodas realigi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn de Unuiĝintaj Nacioj, Esperanto proponas kompletigan evoluvojon al tutmonda partnereco, en kiu kunlaboras ne nur ŝtatoj kun ŝtatoj, sed homoj kun homoj.

125 jarojn post sia apero, Esperanto estas ĉiam pli vaste uzata kiel ponto al amikeco, paco, kaj disvolviĝo – evoluo akcelata per la disvastiĝo de alia tutmonda komunikilo, Interreto. Tion oni vidas interalie per la ĉi-jara aldono de Esperanto kiel 64-a lingvo en la rettradukilo de Google.

Ni invitas homojn el ĉiuj landoj utiligi kaj kunkonstrui tiun ponton, cele al pli justa kaj paca mondo, kie disfloras ĉiuj lingvoj kaj kulturoj."

Ĉiuj partoprenantoj estis dividitaj en tri grupoj kaj ĉiu grupo estis moderigita de gvidantoj (Stephanie Cabovianco, Ary Borensweig, Petra Smideliusz, Adrian Alejandro, Romina Gayo Streinzer kaj Jorge Cabrera) La ĝenerala celo estis pripensigi.

La temo por la unua ronda tablo estis: Kio estas ponto? Ĉu la ponto ligas malsimilajn kulturojn, esprim-nivelojn, mon-nivelojn, ktp. Enkondukante la temon oni povis klarigi ke ponto estas dusenca aŭ mult-senca vorto. Ĝi povas rilatiĝi vertikale kaj horizontale en la homaro. La celo de la ronda tablo estis pripensi kiel integri la ĉeestantojn. Jen kelkaj konsideroj: helpantaj anĝeloj, bazan vortaron, toleremo.

Post la unua ronda tablo kaj la kafopaŭzo Pablo León prezentis filmon: "La Universala Lingvo" Ĉi tiu dokumenta filmo pri Esperanto estis verkita de Sam Green, Oskar-premia nomumito, kiu elmontris spegulan bildon de la esperanta movado. Post elmontro de la filmo, la ĉeestantoj interŝanĝis komentojn kaj ideojn pri la proponitaj temoj (finvenkismo, celoj, viva lingvo). Ĉiuj konsentis ke esperanto vivas tra ni mem.

Je la vespero, Petra Smideliusz brile prelegis en la aŭditorio pri TEJO kaj Alfredo Juan Valle, saĝe kaj profunde, parolis al ni pri Menso kaj Paco, enkondukante nin en la historio de la homa penso, de la antikveco ĝis Krishnamurti.

Post la kafopaŭzo ni envenis en la duan rondan tablon. La temo, preskaŭ luda temo: “konstrui grupe pontojn” (6 grupoj). La ĝenerala celo estis spertigi. Unue ĉiuj desegnis surpapere kaj poste konstruis. Ĉiu grupo strebis por konstrui la plej belan, taŭgan kaj staripovan ponton, laŭ sia grupa kriterio. Rimedoj: kartuno, vermiĉeloj, gluajo, fadeno... La gajninta grupo, post voĉdonado (bone zorgita de Petra) estis premiita! Poste ni vicigis la tablojn por ke la plej longa ponto fariĝis ununura ponto konstruita de ĉiuj. Kion ni spertis? Ĉiu grupo konstruis specialan kaj belan ponton. Altaj, pendaj, longaj, solidaj...ĉiuj malsimilaj. Estas temo por la tria ronda tablo!



Nova kafopaŭzo kaj la grupo "Pilko sen manumo" (Jorge Montanari) kaj denove surprizis nin per sia amuzega prelego pri alternativaj sportoj.

Kaj je la fino Petra Smideliusz sperte kaj agrable, vere agrable montris al ni sekretojn de hungara kuirarto kaj, ŝi ne sole eksplikis, si preparis tre bongustan hungaran supon, kaj ĉiuj... ĉiuj... plezure gustumis ĝin kaj... gustumadis! Dankon Petra!

Fine, je la alveno de la tagfermo, ni ĝuis belegan, veran, tre bonstilan spektaklon de tango-dancado kiun sekvis partopreno de ĉeestantoj, entuziasmitaj por danci.

Dimanĉo, la 7-a de oktobro

Ni organizis rondan tablon por pritrakti la trian temon: Kia estas nia ponto? Pri la konkreta ponto konstruita de ĉiu grupo. La grupanoj insterŝanĝis ideojn kaj devis plenigi (individue) formularon pri sia sperto. La celo estis pripensigi la grupanojn pri sia propra agado en la grupo, ĉu ili partoprenis aŭ nur spektis la agadon de aliaj membroj? ĉu ili konstruis ĉion tute solaj? ktp... Spite ke ne estis malpermesite unuigi pontojn, nur du grupoj proponis tion. Kiam ni vicigis la pontojn linie, estis rimarkebla afero konstati ke preskaŭ neniu el la pontoj, pro sia strukturo speciala, ebligis transiri de unu al la alia.

Konkludo de la kongreso

La kongresanoj proponas:

1) la starigon de lingvaj rilatoj, ne nur horizontalaj sed ankaŭ inter tiuj kiuj staras je malsimilaj niveloj de Esperanta esprimkapablo, kompreno kaj kono.

2) la trejnadon de instruantoj kapablaj por konstrui "pontojn" inter tiaj niveloj.

Post la ronda tablo, Petra Smidéliusz, la loka organizinto de la Tutmonda KER-ekzameno en Bonaero, Argentino, akompanata de honora gasto transdonis la ekzamenatestilojn al la sukcesintoj kadre de festeto dum la 54-a Argentina Kongreso de Esperanto.

Leginte la raportojn pri la aliaj festoj ĉirkaŭ la mondo, Pablo León, loka aktivulo ekhavis la ideon sekvi la brilan ekzemplon de la limoĝanoj, kaj vestis sin kiel Doktoro Zamenhof por lude transdoni la atestilojn. La 9 personoj, kiuj ĝoje transprenis siajn dokumentojn, konsideras sin pioniroj, ja ili estas la unuaj trapaŝintoj de la KER-ekzameno en Argentino. Ĉar jam pluraj personoj esprimis sian fortan deziron trapasi KER-ekzamenon, Bonaero certe aliĝos al la sekva Tutmonda Sesio en 2013.

Post la Asembleo de Argentina Esperanto-Ligo okazis kafopaŭso, ni fotis unu al la aliaj kaj ĉiuj prenis grupan fotaron.

Emocie ni kantis *La Espero* kaj ni ĉiuj spertis kortuŝan momenton... Ni tostis kaj... dancis rondan dancon. Ni ĉiuj ĝuis dancante belegan dancon, tre bone gvidita de Romina Gayo Streinzer. Dankon Romina!

Poste ni, bedaŭrinde devis adiaŭi al niaj karaj amikoj!

Raporto de Jorge Cabrera
Sekretario de Argentina Esperanto-Ligo
http://ake54bonaero.blogspot.com.ar/

Kontinentaj komisionoj de UEA: ponta rolo de la landa agado



Okaze de la 97-a UK en Vjetnamio ni invitis komitatanojn, aktivulojn kaj reprezentantojn de landaj asocioj kaj kluboj partopreni la kunsidon de subkomitato 6 por pridiskuti la proponitajn demandojn, interŝanĝi opiniojn kaj spertojn kaj fari konkretajn rekomendojn al la komitato: kiel plifortigi la rolon de la regionaj komisionoj; kion UEA bezonas de la regionaj komisionoj por efika kunlaboro kaj integriĝo?

Ĉi-foje kunsidis la regionaj komisionoj de UEA, nome pri Afriko, Azio, Meza Oriento, Norda Afriko kaj Eŭropo. Tamen ne povis okazi kunsidoj pri Oceanio kaj Ameriko.

Ĉiuj komisionoj raportis pri siaj respektivaj agadoj, problemoj, komisionanoj, planoj kaj defioj, kaj informis pri la bezonoj trovi monon por fondaĵoj cele al plenumo de diversaj projektoj.

La landa kaj regiona agado havis gravan momenton dum la subkomitata kunsido, faranta kelkajn rekomendojn, kiujn poste aprobis la komitato de UEA.

Tiurilate ni petas la regionajn komisionojn kaj per ili la landajn asociojn, laŭ decido de la komitato, esplori la realajn problemojn de la landaj organizoj, tiel ke eblaj helpoj kaj solvoj estu komune troveblaj. Sen dube kunlaboro kaj integriĝo estos esencaj por atingi la celon.

Maritza Gutiérrez González
UEA-Estrarano pri landa kaj regiona agado
"Esperanto", oktobro 2012, p. 203

Pli ol 3000 en la Facebook-komunumo de UEA

La paĝo de UEA en Facebook superis 3000 ŝatantojn la 22-an de septembro. Plej populara ĝi estas en Brazilo, kie ĝi havas 352 ŝatantojn. Sekvas Usono (280), Francio (195), Italio (144), Hispanio (136), Pollando (128), Germanio kaj Meksiko (po 108), Argentino (93), Rusio (73), Hungario (72), kaj Britio (65). La plej granda kresko okazis en la ĉi-jara kongreslando Vjetnamio, kie la ŝatantoj plimultiĝis dum la lasta jaro de nura deko al 46.

La plej multnonbre reprezentataj urboj estas Rio-de-Ĵanejro (44), San-Paŭlo (42), Parizo (40), Santiago de Ĉilio (31), Hanojo kaj Vilno (po 30), Budapeŝto (29), Bonaero (28), Seulo (26), Moskvo (25), kaj Braziljo kaj Madrido (po 23).

La seksa distribuo de la ŝatantoj estas plimalpli sama kiel tiu de la individua membraro de UEA: 27,5% estas virinoj kaj 70,9% viroj (sekso de 1,6% ne estas konata). La UEA-komunumo en Facebook estas tamen multe pli juneca ol la membraro, eĉ se rekta komparo estas malfacila pro malsamaj aĝlimoj en la statistikoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 473

Amindaj koncertas en la reta kinejo de UEA

La muzika ensemblo *Amindaj* gajnis grandan popularecon per siaj koncertoj en la 95-a UK kaj 67-a IJK en Kubo en 2010. Intertempe aperis ankaŭ ĝia unua kompakta disko ĉe la eldonejo Vinilkosmo. Nun ankaŭ tiuj, kiuj ne spertis la grupon en viva koncerto, povas spektiĝin en la Reta Kinejo de UEA, por kiu Francisco L. Veuthey registris ĝian prezentadon en la 67-a IJK.

Amindaj estas kultura projekto, kiu kombinas la tradiciajn muzikon kaj dancojn de Kubo kun Esperanto. La grupo fondiĝis en 2009 en la urbo Contramaestre. Ĝin iniciatis Graciela Morgado Rodríguez kaj ĝi debutis publike en februaro 2010. Plimulto de la kantoj de *Amindaj* estas verkitaj, komponitaj kaj adaptitaj de la konata esperantisto kaj muzikisto Julián Hernández Angulo, ĉi-jare premiita de UEA per Diplomo pri Elstara Agado. Aliajn kantojn adaptis Maritza Gutiérrez González. *Amindaj* utiligas tradiciajn kubajn instrumentojn.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 471

Forpasis
Donald Broadribb (1933-2012)

Honora Membro de UEA, d-ro Donald Broadribb forpasis la 13-an de oktobro. Li naskiĝis en Usono sed ekde 1974 vivis en Aŭstralio. Broadribb studis filozofion, teologion kaj lingvistikon en Usono kaj Aŭstralio kaj psikanalizon en Svislando. Li esperantistiĝis en 1946 kaj membriĝis en UEA en 1950. Li redaktis plurajn Esperanto-gazetojn: Kristana Bulteno en Usono en la 50-aj jaroj, Nord-Amerika Esperanto-Revuo (1959-62), Biblia Revuo (1964-72), La Nigra Cigno (bulteno de Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio, 1980-88), kaj Esperanto sub la Suda Kruco (1989-2008). En 2008 li fondis la retrevuon ***Mirmekobo***, de kiu ĝis oktobro 2012 aperis 21 numeroj. Kun G. Rust li kompilis Terminaro de bibliaj studoj (1973). En 1967 li kunfondis ĉirkaŭ "Biblia Revuo" Internacian Asocion de Bibliistoj kaj Orientalistoj.

Broadribb estis grava tradukisto. Krom du verkoj de Platono, La respubliko kaj Kratilo (la unua el kiuj gajnis la OSIEK-premion en 1995), li esperantigis Alico en mirlando kaj Trans la spegulo de L. Carroll, La mirinda sorĉisto de Oz (L. Frank Baum), Eposoj el Antikva Ugarito, Mil naŭcent okdek kvar (G. Orwell), kaj plurajn tekstojn el la Mortmaraj rulaĵoj Qumran. Amaso da artikoloj kaj tradukaĵoj el lia plumo aperis en diversaj Esperanto-gazetoj ekde 1948. Li kontribuis per tradukoj ankaŭ al Aŭstralia antologio (1988). Broadribb estis membro de la Akademio de Esperanto (1972-81 kaj 1992-2001) kaj juĝanto pri prozaĵoj ĉe la Belartaj Konkursoj de UEA (ekde 1995). Rekone pro liaj meritoj Aŭstralia Esperanto-Asocio donis al li la titolon de Fratulo en 1996. En la 82-a UK en Adelajdo en 1997 li estis nomumita Honora Membro de UEA.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 475

Anoncoj

Kurso de Esperanto

Karaj geamikoj, mi nun skribas por diskonigi la eblecon fari retan, internacian kurson de Esperanto je Universitata nivelo (B2 - C1 aŭ pli). La pola Jagelona Universitato donas tiun eblecon. Mi jam faris la kurson dum junio. Ĝin gvidas la universitata instruistino Maria Majerczak. La kurso fariĝas pere de *skypo,* kaj virtuala tabelo sur kiu la lernantoj kaj la instruistino skribas. Do tiu kurso estas en virtuala ejo, sed vive kaj dinamike gvidata de Maria Majerczak. La grupoj estos malgrandaj (7 - 10), sed bezonas kelkajn partoprenantojn el A landoj (laŭ UEA-kategorioj) por ke ĝi povu efektiviĝi, laŭ la postuloj de la Universitato. La kurso devus ekkomenci baldaŭ.

Por esperantistoj, kiuj loĝas for de studcentroj estas tre grava, ne valorebla oportuneco. Apogu tiun iniciaton diskonigante ĝin al viaj amikoj, konatuloj, samklubanoj, ktp.

Por informoj skribu al Maria Majerczak: *<mmajerczak@gmail.com>*

Antaŭdanke

Sonja Riso
Montevideo, Urugvajo

Dankesprimoj - Agradecimientos

La redakcio de SEK-Bulteno kore dankas pro sia ĝentila monkontribuo al:

Alicia Aranda
Familio de Alejandra Kaleniuk
Carlos Stacul
Ernesto Moreira Martin
José Luis Scanferlato
María Berna Morzán